**ILEI kongreso - Linjano Orsabla 08/08/2023**

# Edukado por nova mondo

## Maria Montessori kaj Antonietta Bernardoni



Saluton al ĉiuj. Mi estas Ermanno Tarracchini el Modeno, Italio. Mi diplomiĝis pri biologiaj sciencoj kaj specialiĝis pri subteno al tieldiritaj *"alimaniere kapablaj",* nun mi estas emerita profesoro ĉe la Universitato de Modeno, pri bio-pedagogiaj strategioj por lerneja kaj socia inkludo - de ĉiuj diversaj gelernantoj.

NOTA. Mi studis kaj trejniĝis pri neuropedagogio en Parizo, kaj partoprenis, dum pli ol tridek jaroj, la asembleojn de "Popola Terapia Agado" fare de Antonietta Bernardoni.
Mi Esperantiĝis en 1996.
Mi verkis "Ni reprenu pedagogion", 2015 kaj, kune kun Valeria Bocchini, "Neŭropedagogio kaj neŭrodidaktiko, aŭ DSA? (Specifikaj Lernad-perturboj)", 2020

# Edukado por nova mondo



**Maria Montessori (1870-1952)**



**Antonietta Bernardoni (1919-2008)**

Nota: Ambau konis kaj spertis sciencan pedagogion al la lumo de la dialektiko inter biologiaj kaj sociaj aspektoj: Montessori pri la edukado de la knaboj enfermitaj en la malsanulejo kaj por la formado de la absorba menso je *“la knabo patro de la homo”* kaj Bernardoni, por evoluigi konscion de specio, inter la membroj de la homa specio, kaj por la resanigo de tieldiritaj mensmalsanuloj, (per antrop-evolua malalienigo, scienca kaj solidareca agado)

# Edukado por nova mondo

Maria Montessori kaj Antonietta Bernardoni: du gravaj sciencistinoj kiuj interkonatiĝis, kaj dediĉis siajn vivojn al "edukado por nova mondo", al la kresko kaj ŝanĝo de la homa personeco por akiri mensan bonfarton kaj por akirigi al la homoj konscion de ilia komuna aparteno al la homa specio.



*"La mano estas la organo de la intelegenteco"*
*(M.Montessori)*



"La sekreto de homaj faktoj apartenas al la scienco de la historio"
(A.Bernardoni)

**Note: Maria Montessori kaj Antonietta Bernardoni**, du inaj kuracist-sciencistinoj kun universitata trejnado en medicina-klinika kampo, kvankam kun malsamaj vojoj, traktis la problemon kun la sama malmediciniga kaj malalieniga aliro, tiu de alproksimiĝo kun si mem kaj kun la mondo de sociaj rilatoj por ĉiuj homoj, kiuj malalproksimiĝis de ĝi,

- ĉu temas pri la "normaligo" de infanoj enfermitaj en aziloj, pri kiuj zorgis Montessori,

- - ĉu temas pri la resanigo de la tiel nomataj "mensaj malsanuloj" per konkretaj analizoj kaj transformoj de konkretaj situacioj kaj la mobilizado de subtena reto de civitanoj, familianoj, najbaroj, amikoj, laborkunuloj - kiu trovis sian funkcian esprimon en la asembleoj de "Popola Terapia Agado" – fare de Antonietta Bernardoni

# Kio estas la scienca pedagogio de Maria Montessori?




La scienca pedagogogio de Maria Montessori estas nova scienco de la infanaĝo kiun Maria Montessori, (la plej grava, kaj monda fama, itala eduka-pedagog-kuracistino) nomigis kaj praktikis, kiel "Metodo de la infano" sed kiun la komerca eldonado volis, profite, oficialigi, kiel "Montessori metodo".

Note: Sed ne ekzistas vera intereso pro la progreso de la homaro se oni ne sentas ankaŭ "la devo preni flankon" kiel diris la itala pastro de *"letero al instruistino",* Don Lorenzo Milani.

Maria Montessori prenis flankon. Li helpis al "edukado por nova mondo". Ŝi aliĝis al tiuj, kiuj estis, kaj ankoraŭ estas, rifuzitaj esencaj rajtoj - infanoj, do, kaj virinoj - kiel pruvas ŝia agado favore al la unuaj internaciaj feminismaj movadoj de la tempo.

# **Maria Montessori: Flanke de la infanoj.**

**La geinfan**oj **dirus** se ili povus:



"Helpu min fari ĝin mem"

"Sekvu min kaj ne antaŭu min"

"Lasu min la liberan elekton pri miaj objekt-lernadoj"

- Respektu miajn "sentemajn periodojn" ekde mia naskiĝo...
- Konu mian"sorban menson" kiu sorbas ĉiujn stimulojn de la ekstera medio.
- Konu la nebulozojn de mia menso (hodiaŭ ni dirus: potencialoj de neŭrologiaj mapoj de la menso kiuj devas esti evoluigitaj per edukado)
- Konsideru mian manon kiel organo de la inteligenteco...

# ”La metodo de la Science Pedagogio aplikita al la infana edukado"

Skribis Maria Montessori inter 1909-1913...

*“...Tamen, malsame ol miaj kolegoj, mi havis la intuicion, ke la problemo de la ” infanojn enfermitajn en mensa malsanulejo " estis ĉefe pedagogia, prefere ol ĉefe medicina;*
( Maria Montessori, “*La metodo de Scienca Pedagogio aplikita al infana edukado en infanhejmoj*” 1913 p. 27)

*Note...kaj dum multaj homoj parolis en medicinaj kongresoj pri la pedagogia-medicinmetodo por la traktado kaj edukado de “infanojn enfermitajn en mensa malsanulejo, mi faris ĝin temo de morala edukado ĉe la Pedagogia Kongreso de Torino en 1898..." ...kaj mi pensas, ke mi trafis tre viglan kordon ekde la ideo, pasita de kuracistoj al bazlernejaj instruistoj, disvastiĝis fulmrapide kiel vivanta afero interesa la lernejon”.*

# Kio estas la scienca pedagogio de Maria Montessori?

*...fakte M.Montessori prelegis al Pedagogia kongreso de Torino en 1898..kaj diris..."*



*"...Scienco procedas per observado, sed observado ne devas fariĝi rezignacio, neniu infano, eĉ se pritaksita kiel malsanulo aŭ* tardulo*, povas esti ekskludita de la scienco kiu koncernas lin, la Pedagogio".*

## La “normaligo” laŭ Maria Montessori kaj Antonietta Bernardoni

Maria Montessori kaj Antonietta Bernardoni, ambau per la paŝo de la klinik-mediciniga vidpunkto al **la** soci-**pedagogi**a **aliro**, eksperimentis, pratike kaj teorie, la proceson de "normaligo” alivorte “resanigo” **de infanoj kaj plenkreskul**oj **psikiatrigitaj** eĉ **enfermitaj en mensa malsanulejo.**

Note: Antonietta Bernardoni spertis, aparte, la "normaligon" (en tiu ĉi kazo oni povus diri la “resanigon") de psikiatrigitaj plenkreskuloj, eĉ enfermitaj en mensa malsanulejo, dank al malapero de ĉiuj aĉaj kondutoj per solidareco kaj konkretaj trasformoj de konkretaj situacioj, post la partoprendo al la asembleoj de Popola Terapia Agado

# La "ingrediencoj" de la "normaligo"

La "ingrediencoj" de tio, kion Maria Montessori difinis kiel la "normaligo" de agititaj infanoj aŭ infanoj kun interrilataj problemoj kaj lernproblemoj, kiujn ŝi observis, okazantaj en la aĝo de tri-kvar jaroj en infanhejmoj, estas: ekstera medio preparita.

Favori la lernan aŭtonomecon en formi sin per

la "helpu min fari tion mem",

la "sekvu min, ne antaŭu min",

la "libera elekto"

per ***"riĉa pretigita tablo"*** kun multe da stimuloj, kun multe da materialoj kaj proponoj por permesi al la geknaboj liberan elekton inter la materialojn, kaj fareblaj aktivecojn.

Note: Por Antonietta Bernardoni la ingrediencoj por la "normaligo" de infanoj estas plejparte la samaj kiel la procezo de "sanigo" la tielnomita "mensa malsano": transformo de la mondo ekster la individuo en malfacilaĵo (preparita "kiel Montessori-tablo plena" de ŝancoj"), homa atento kaj aŭskultado, kritika analizo, memkritiko, solidareco, analizo de povo-rilatoj en la familio kaj en grupetoj, lukto kontraŭ timoj, alprenante la vidpunkton de aŭtobiografia historio, plibonigante la personecon de tiuj, kiuj suferis la perforton de psikiatria diagnozo, reciproka helpo.

# Esperanto kaj Montessori

Fakte, la esperantista mondo konsciis pri la graveco kaj bezono de tiu nova Montessori scienca pedagogia aliro, pro tio en 1958 esperantigis por la Esperanto-revuo de la FEI, la artikolon de 1923-2 paĝo 24. (sed jam en 1920 artikolo pri Montessori aperis en la Esperanto-revuo de UEA pag 130-131

Du artikoloj pri la "Metodo Montessori" troviĝas en "Esperanto de UEA", respektive 1920-7/8, paĝoj 130-131 kaj 1923-2, p. 24. Mi transskribas la artikolon de 1923, kaj la anoncon aperintan en "L'Esperanto de FEI" 1958-51/52, p. 24 (kun bedaŭro pro la neekspluatita okazo).

("Esperanto de UEA" 1923-2, p. 24)

**M. Montessori ekvidis la iluzion, en kiun falis la eksperimenta psikologio**, opinianta ekkapti la leĝon el la komenca minuto de la infana reago! La psikologia vivo de la homo povas esti legata nur tra la **procedo de ĝia formiĝo**, kiel **la homara vivo estas klarigata nur el la tuta historio**, kaj **ne el la rapidema momento.**

Do, en tia pruva kampo por la studo de l'homo, en tiu infana renovigita lernejo, estas eble renkonti la verecon de la biologia leĝo, dum la sciencisto, devigita observi infanojn ne vidatajn en kondiĉoj de plena libereco, eltrovas nur verecojn el sociala kaj tempa karaktero.

**Montessori kaj Esperanto, en Ĉinio kaj Indonezio**

Februaron (2012), en Esperanto Insulo,

Mi partoprenis en Ĉinio **al grupo Montessori-Esperanto**

Federico Gobbo,
Ermanno Tarracchini,
Ron Glossop

Mi partoprenis en Ĉinio **al grupo Montessori-Esperanto** kun Federico Gobbo, Ron Glossop kaj Penny Vos (el Aŭstralio) kiu gastigis neformalan kunsidon pri **Montessori edukado** por proksimume 15 partoprenantoj, **kiuj interesiĝis por promocii instruadon de esperanto ĉe montesoraj lernejoj.**

Ĉi tiu grupo fariĝis la bazon de nova Yahoo grupo "Montessori Esperanto". La menciitaj georganizantoj kaj aliaj kunlaborantoj daŭrigis laboron ĉe la retejo - http://www.MontessoriEsperanto.org -

Ĉi tiu nova scienco de **“edukado por nova mondo”,** estas karakterizita per aliro jam identigita kiel necesa kaj praktikata tiutempe kiel formo de integrita observado kaj pratikado inter **Neurologio** kaj **Pedagogio**, ( sen difini ĝin “NeŭroPedagogion” kiel mi difinis ĝin en mia libro “Ni reprenu pedagogion” bedaurinde nur en la itala lingvo sub la titolo “Riprendiamoci la pedagogia)  kaj per **Maria Montessori** rilate al infanoj enfermitaj en mensaj malsanulejoj, kaj per **Antonietta Bernardoni** rilate al la resanigo de la tiel nomata “mensa malsano” de junuloj kaj plenkreskuloj )

# Maria Montessori kaj Antonietta Bernardoni:

*“Du esploristinoj, kies aliro celis ne nur "malkonstrui medikaligon, kiu fariĝas sufoka nuntempe ĉar la psikologoj volas respondi al ĉiuj problemoj, ankaŭ al tiuj de eduka naturo", kiel atentigas Grazia Honegger Fresco (Montesora pedagogistino, kiu skribis prefacion al mio libro “Riprendiamoci la Pedagogia” kaj bedaŭrinde mortis en 2020) sed ankaŭ por reliefigi la gravecon de la ĉirkaŭa medio, mobilizita ekzemple de Antonietta Bernardoni per la Asembleoj de "Popola Terapia Agado" kaj Reciproka kaj Daŭra Edukado.*

# “Ni reprenu la pedagogion”

## De la *“scienca pedagogio”* de Maria Montessori ĝis la *“Antrop-evolua Malalienigo scienco” fare* de Antonietta Bernardoni

“Ni reprenu la pedagogion” **estas** mia libro, bedaŭrinde nur en la itala.
Kaj laŭ wikipedia voĉo, de mi mem farita:




*“Neŭropedagogio estas nova scienco pri lernado, edukado kaj formado de la personeco bazita sur la dialektiko inter biologiaj kaj sociaj aspektoj. Scienco kiu integras la biologian aspekton de la neŭrologio kaj la sociedukan aspekton de la pedagogio, je la lumo de historiaj, valoraj, filozofiaj, moralaj kaj spiritaj procezoj.* Scienco, kiu ne restas neŭtrala - sed flanke de la prematoj *konsideras ankaŭ la efikojn de povo-rilatoj kaj ekspluatado sur la homo fare de la homo.”*
(Riprendiamoci la Pedagogia” E.Tarracchini, 2015)

# Dialektiko de biologio kaj socio en la psikiatria problemo



Ekzistas kondutismaj ŝanĝoj ligitaj - en maniero science konstatita aŭ konstatebla - kun akutaj aŭ kronikaj ŝanĝoj de la centra nerva sistemo: ili apartenas al medicina branĉo nomata neŭrologio. Kvankam neŭrologio foje kapablas doni ĝisfundajn klarigojn rilate al la kaŭzoj, mekanismoj de komenco, evoluo, prognozo, kaj ankaŭ al eblaj farmakologiaj aŭ dietaj terapioj, ĝi devus - laŭ nia opinio - pli multe konsideri la rezultojn akiritajn de la sciencoj de lernado kaj edukado.

*Note: Antonietta Bernardoni estis konvinkita, ke estas al ni ĉiuj meti la fundamentojn de vera scienco, kiu, por esti tia, devos esti la scienco de malpsikiatrigaj procezoj nepre bazitaj sur konkretaj scioj devenantaj el la studo de sanigaj procezoj. Ne plu psikiatrio sed "antropo-evolua malalienigo" je la bazo* de la Asembleojn de "Popularа Terapia Agado" kiujn ŝi starigis. "Terapia" en tiu ĉi kazo estas nur en la senco de pedagogia prizorgo kaj tute ne klinika – formita de multaj homoj kiel spertuloj, ĉiuj, por sia propra vivo, ne "spertuloj" pri la vivo de aliuloj kiel psikologoj, sed ankaŭ eblaj aliancanoj por persona ŝanĝo kaj kresko

# *"Antrop-evolua Mal-alienigo*

*“konsistigas la sintezon de preskaŭ kvardek-jara esplorado ankoraŭ daŭranta (1987) bazita unuflanke sur la observado - en la faktoj - de la plastikeco de la cerbo kaj aliflanke sur konkreta transformo de konkretaj situacioj per la starigo de interhelpaj grupoj por la formado de personeco per la engaĝiĝo de ĉiuj.”*

# Pedagogio..kio estas?




Sed hodiaŭ pedagogio, en Italio, preskaŭ ne plu ekzistas... anstataŭita de la psikologio per ĝia suspekt-kulturo de perturbojn ( psikologjo, ekzemple, parolas per akronimoj ADHD, DSA...kaj etikedoj de...disleksio, disgrafio... en la lernado kaj en ĉiuj kampoj de ĉiutaga vivo

# Pri tiu-ĉi medikalig-kulturo je suspekto de perturboj donas al ni - taugan ekzemplon per rakonteto - la fama itala pedagogo G. Rodari



**La nigra suno**
Mia knabineto desegnis karbonigran sunon
Nur ĉirkaŭita de kelkaj oranĝaj radioj.
Mi montris la desegnon al kuracisto.
Li balancis la kapon, kaj diris:
"La kompatind-ulino, mi suspektas, estas turmentata pro
malĝoja penso, kiu igas ŝin vidi ĉion nigra. En la plej bona
kazo ĝi estas vidmanko: portu ŝin al okulkuracisto”.
Tion diris la kuracisto kaj mi estis mortanta pro timo.
Sed, tiam rigardante plej bone la suban parton de la desegno,
mi vidis, ke tie estis skribita, en malgrandaj literoj:
**"la eklipso".** (Gianni Rodari)

Note: Nuntempe, tamen, la amasa invado de la eduka kaj socia sfero fare de la psikologio, reduktante la pedagogiajn sciencojn al "servistinoj de la psikologio" kiam ne tute forigitaj, preparas la kulturan terenon - socian kaj lernejan - **al kulturo de suspekto de la perturboj,** kiu, pro la unua malfacileco je vivi, kreski, lerni aŭ kompreni, trovas respondon en la klinika-diagnoza praktiko de "psikologiaj" intervenoj kaj en la hontindaj kaj kontraŭsciencaj inteligentecmezuraj testoj (IQ), ignorante la "disdonitan inteligentecon” - en la tuta korpo kaj ekster ĝi - de la ĉirkaŭa eduka mondo.

Skribas Antonietta Bernardoni pri tiu ĉi temo en sia libreto “La psikiatrio kontraŭ la lernejo”:




“La ekzisto de lerneja psikologo, deprenante de la instruisto la respondecon, kreas sentojn de nekapableco en la plej lertaj instruistoj kiuj vere volas helpi la "malfacilan" infanon, sed ili pensas ke, ĉar ili estas senigitaj de la 'fundamentaj' psikologiaj scioj, ili ne estas kapablaj fari tion.

Note: Sed ili estas pli kapablaj auskulti kaj kompreni iliajn bezonoj ol la psikologoj ĉar la edukisotj pasas multe pli da tempo kune kun la gelernantoj kaj konas plej bone iliajn bezonojn...krome la instruistoj kaj la edukistoj povus profundigi la lernadon de la procesoj de la mensa aktiveco pere de la neuro-pedagogio.

Aliflanke la ĉeesto de la psikolgo en la lernejo kreas alibion por instruistoj malpli engaĝitaj kiuj diras "estos la tasko de la psikologo," se ne solvi la problemon de la infanoj, almenaŭ atribui al la nekapablo de la infanoj mem siajn lernejan fiaskojn kaj siajn malfacilecon de socialigo.
Por ĉi tiu nekapablo ekzistas alibio, kiun ni tute ne akceptas: estas alibio reprezentita per la aserto ke ĉi tiuj estas problemoj ke nur psikologio, psikanalizo, psikiatrio estas kapablaj solvi.
Male, la dok.ino Antonietta Bernardoni, afermas ke: “En la kampo de justaj interpersonaj rilatoj, ni ĉiuj devas esti esploristoj kaj sciencistoj por ke neniu estu tia speciala kaj aparta maniero”

NeŭroPedagogio naskiĝis, la**ŭ** miaj profesiaj kaj fakaj studoj, kiel alternativa scienco al la psikologio, ĉar, kiel diris Antonietta Bernardoni:

> **“nek psikologio, nek psikiatrio, nek psikanalizo, iel tenas la sekreton de homaj faktoj pro la simpla kialo ke tia sekreto ne estas de psikologia, psikiatria, aŭ psikanaliza naturo, sed ĝi povas esti malkaŝita nur per la scienco de la historio.”**

Note: Se, por la studo de la homa personeco, anstataŭ supozataj intrapsikiaj strukturoj kaj neraciaj interpretoj, oni alprenas la observadon, l’analizon kaj konkretan transformon de la procezoj fremdigantaj la homan personecon, je la lumo de la dialektiko de biologiaj kaj sociaj aspektoj - pedagogio kaj neŭropedagogio - povas finfine repreni la rolon, kiun ĝi meritas en la socio kaj en la lernejo.





Ni petas nur la atenton de legantoj/aŭskultantoj aparte pri du gravaj pripensoj.

- Ĉu la pedagogiaj sciencoj vere devos esti anstataŭitaj de psikiatrio, psikologio kaj psikanalizo?

- Ĉu la psikiatro kaj la psikologo estas senespere destinitaj fariĝi "la instruistoj de instruistoj"?

En Antonietta Bernardoni Pedagogio kaj Poetiko estas kunfanditaj. Ĉar la konstruado de la nova scienco difinita kiel "Antrop-evolua Malalienigo" por la evoluo de specia konscio bezonas larĝan spiron kaj pli larĝan horizonton, al kiu poezio povas kontribui.




Fakte *"Kuracistino Bernardoni, elkore* interesiĝis *kaj konkrete zorgis pri* ***la diferenco inter - kiel la homoj estas kaj kiel ili povus esti, do - la diferenco inter reala persono kaj potenciala persono"*** *

pri tio skribis la poezion:

## Loĝas en vi potenciala vivo

"Loĝas en vi potenciala vivo
ke vi ankoraŭ ignoras.
Ĝi estas en vi, sed vi ne vidas ĝin:
rigardu ĝin, kaj ĝi fariĝos reala vivo"




* El notoj kiujn Mariagrazia Campana skribis dum parolado de A. Bernardoni en la asembleo de Popola Terapia Agado,1977.


*“Kaŝita en la realo estas la eblo “* *(pag.72)*

Estas io pli bona en la realo
jam estas, sed ĝian fortikecon vi ne perceptas,
kaŝite, senmove, ĝi ankoraŭ dormas
vekos ĝin via voko al alianco



Nia celo estas diskonigi la ideojn de A. Bernardoni kaj igi la homaron akiri specian konscion, do mi esperas ke iu esperantisto tra la mondo volas traduki al sia propra nacia linguo “La ĉiutaga vivo kiel historio” kiu estas libere elŝutebla ĉe ILEI https://www.ilei.info/agado/chiutaga_vivo.pdf




Dankon pro via partopreno kaj atento!